- 23 Nakamura T.: Enciklopedieto Japana. Eldono de Kosmo, Osaka, 1964.
- 24 Novák J., Špička I.: Prvá přídrž/Unua perbraka blokado, Praha, ĈEA, 1984.
- 25 Novák J., Špička I.: Iom pri la rompumatakoj. Praha, ĈEA, 1985.
- 26 Novák J., Špička I.: Konvero. Praha, ĈEA, 1987.
- 27 Novák J., Špička I.: Iom pri la mensa sinpreparo. Praha, ĈEA, 1985.

## Enkonduko

## Antaŭparolo al la Esperanta eldono

## Unua parto - enkondukaj notoj

1.1. Du programoj . . . . .	2
1.2. Kio estas kaj kio ne estas sindefendo . . . . .	2
1.3. Kio necesas por la solvado de la sindefendo-situacioj? . . . . .	3
1.4. Kiam ni batalas? . . . . .	5
1.5. Kiel eviti batalon? . . . . .	7
1.6. Okazaj rimedoj . . . . .	7
1.7. Uzado de insidateko . . . . .	9
1.8. Reagotempo kaj sukcesa apliko de defendagoj . . . . .	10
1.9. Lau kio oni povas reagi? . . . . .	12
1.10. Klasikaj batalkompleksoj kaj reduktita kurso . . . . .	14

## Dua parto - batalagoj

2.1. Batalagoj . . . . .	16
2.2. Korpa sinpreparo . . . . .	(16)
2.3. Translokadoj kaj staroj . . . . .	17
2.4. Frapoj . . . . .	18
2.4.1. Rektmanfrapo . . . . .	19
2.4.2. Eleksteraj batoj . . . . .	(25)
2.4.2.1. Eleksteraj tord-brakofrapoj . . . . .	(25)
2.4.2.2. Elekstera manfrapo . . . . .	(25)
2.4.3. Manfrapo (au hako) flanken . . . . .	(25)
2.4.4. Elsupre hako . . . . .	(25)
2.4.5. Rekt piedfrapo antaŭen . . . . .	(25)
2.4.6. Elsuba piedfrapo . . . . .	25
2.4.7. Rekt piedfrapo flanken . . . . .	(27)
2.4.8. Alklin-piedfrapo flanken (= laktidzo) . . . . .	(27)
2.4.9. Jetado per tranĉilo . . . . .	(27)

## Tria parto - apliko de batalagoj

3.1. Kiam oni aplikas frapojn . . . . .	27
3.2. Kiam ataki? . . . . .	28
3.3. Metodoj de sinsekurigo . . . . .	30
3.4. Tipoj de batalo lau pozicio de batalantoj . . . . .	(34)
3.4.1. Nestarbatalo . . . . .	(34)
3.5. Kuliso de la sindefendo-situacio . . . . .	(34)
3.5.1. Batalo en akvo . . . . .	(34)
3.5.2. La nokto-batalo . . . . .	(34)
3.6. Batalo kontraŭ grupon . . . . .	(34)
3.7. Uzo de pistolo . . . . .	(34)
3.8. Esti preta estas ĉio . . . . .	(34)
3.9. Reteno de kontraŭulo . . . . .	(34)
3.10. Kio estas evitenda . . . . .	34

## Kvara parto - finaj notoj kaj resumo

4.1. Rilato inter sporto kaj sindefendo . . . . .	36
4.2. Ofteco de la sindefendo-situacioj . . . . .	(38)
4.3. Mensa sinpreparo . . . . .	38
4.4. Resumo . . . . .	(40)
4.5. Epilogo . . . . .	40
S.1. Problemaro de la esperantigo . . . . .	41
S.2. Listo de uzitaj terminoj . . . . .	(42)
S.3. Vortareto . . . . .	42
Referencoj . . . . .	47
Enhavo . . . . .	48



Esperantaj verkoj pri la sindefendo, ĵudo k.s.

de la ĉefaj aŭtoroj

1. Novák J., Špička I.: Scienco pri la sindefendo. Sci. Rev. 28 (1977) 107-111.
2. Novák J., Špička I.: Dek du ĉapitroj pri la sindefendo. Starto (ĈEA, Praha) n-roj 1-6 (1978), (fig.1-22).
3. Novák J., Špička I.: La frapoj kaj ilia strukturo /I/. Sci. Rev. 29 (1978) 157-183 (fig.1-31).
4. Hník V., Jindřich I., Pospíšil J.: Simpla metodo por mezurado de la daŭro de frapoj. Sci. Rev. 29 (1978) 185-190 (fig.1-8).
5. Hník V., Jindřich I., Pospíšil J.: Daŭro de batalagoj. Sci. Rev. 31 (1980) 15-24
6. Novák J., Špička I.: La frapoj kaj ilia strukturo /2/. Sci. Rev. 31 (1980) 25-48 (fig.32-133).
7. Novák J., Špička I., Hník V.: La transdorsoĵeto kaj ĝia rilato al la seoinago. La I-a konferenco pri apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko en Žilina, 14.8 - 17.8. 1981.
- 8.++ Novák J., Špička I., Hník V.: La transdorsoĵeto. Praha, ĈEA, 1982.
9. O Red. Novák J.: Sindefendologiaj studoj I. ĈEA, Praha 1983.
10. + Novák J., Špička I.: Prvá přídrž / Unua perbraka blokaĉo. ĈEA, Praha 1984.
11. O Novák J., Špička I.: Iom pri la rompumatakoj. ĈEA, Praha 1985.
- 12.++ Novák J., Špička I.: Iom pri la mensa sinpreparo. ĈEA, Praha 1985.
- 13.++ Novák J., Špička I.: Konvero. ĈEA, Praha 1987.

Noto: Da broŝuroj, kiuj estas signitaj per ++, troviĝas en ĈEA ĝis nun sufiĉa stoko. Da tiuj, kiuj estas signitaj per +, ĈEA havas nur kelkajn lastajn ekzemplerojn (el la stoko de la aŭtoroj). La mendojn bonvolu sendi al la adreso: ĈEA, Jilská 10. CS-110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

Pri havebleco de respektivaj numeroj de Sciencia Revuo (= Sci. Rev.) demandu ĉe landa delegito de ISAE por Ĉeĥoslovakio (la adreso: Jiří Laube, Kratochvílova 969, CS-413 01 Roudnice nad Labem).

La broŝuroj, kiuj estas signitaj per 0, elĉerpiĝis. Pri ili oni ankaŭ povas demandi en ĈEA, ĉar se estos sufiĉe da intereso, la verkoj estos probable reeldonitaj.


La prezo de ĉiu broŝuro el la pli supre listigitaj estas 10 - 15 Kčs.

Se iu esperanta eldonejo volus reeldoni iujn el la listigitaj verkoj, kontaktu ĈEA-on.

La redakcio.

## LINGVA EVOLUO KAJ BELETRA PRAKTIKO

Kontribuo por la Scienca Interlingvistika Simpozio  
en Varsovio 1988



Estimataj, permesu, ke mi enkonduku mian kontribuon iom netradicie. Kiam la helenan hetajron Frinan unu el la amantoj akuzis pro senpieco, la defendanto - la fama oratoro Hipereido, kiu apartenis dum certa tempo ankaŭ al ŝiaj adorantoj - vidante feblan efikon de siaj vortoj, ŝirtiris al ŝi la robon desur la brusto kaj la juĝistoj, ravitaj de ŝia belo, liberigis ŝin...

Kial mi rifugas al la historio kaj elektas ĝuste tiun ĉi bildon? Anstataŭ kiel ano de la Akademio disvolvi sur la internacia forumo ian reprezentativan lingvoesploran teorion? Ho ne. Mi intencas alparoli vin kiel esperanta poetino. Kaj eventuale kiel aŭtorino de la preparata autobiografia romano Hetajro dancas, kies unu ĉapitro portas titolon Esti kiel Frina. Do la konekso klaras. Cetero eĉ mi, kvankam fizike absenca, fora, sentas min antaŭ vi lingvistoj iom kvazaŭ antaŭ la tribunalo... La hetajron Frinan savis ŝia nekutima belo. Min povas savi sole mia kreado. Kaj mia sperto el ĝi. Mi petas, bonvolu auskulti min!

Kiel komencanta poetino mi ne alfrontis lingvajn problemojn. La poeto relative facile evitas la vortojn, kiuj al li ne plaĉas. De temp' al tempo al mi tamen trudigadis la rimoj, kiujn mi jam uzis, kaj ĉar mi ne emis ripeti ilin, fari poemon iĝis por mi des pli peze... La neologismojn, tiujn mi krom du tri esceptoj ignoris, kiel al mi konsilis Baghy. /La gravajn pasaĝojn el liaj lateroj koncerne ŝi tiun ĉiam aktualan demandon mi citas en la menciita verko./ Ja Baghy! Li sendis al mi fragmenton el la satira versaĵo kunmetita el neologismoj, per kiu li iam mokis sian rivalon Kalocsayon pro lia "poezia vortaro" en la Parnasa Gvidlibro. Margene dirite, la versaĵo de Baghy estas eĉ post dekoj da jaroj fortimiga, sed nur pro tiu nenatura akumulo, ne pro la neakceptebla de la esprimoj mem. Hodiaŭ ili preskaŭ ĉiuj domiciliĝis en la lingvo. Jen kelkaj ekzemploj: obskura, tenebro, primavero, leĝera, pigra, paseo, fola, febla, drola, giri, spekti, jelpi, dekedo, pelmelo kaj aliaj.

Baghy estis eminenta kaj meritplena esperantisto, sed la tempo konfirmis, ke pravis Kalocsay. Kalocsay artisto-ĝeniulo vidis futuron. Jen kiel trafis li analizas la situacion interne de la esperanto-movado en sia libro Lingvo, stilo, formo eldonita en la jaro 1931:

"La alia vojo estas la pligrandigo de la Esperanta vorttrezoro, la tiel nomataj neologismoj. Tre delikata temo!

Rilate ilin la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn.

La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus versi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus plej feliĉa, se la lingvo konsistus el ducent vortoj, se oni povus skri-

bi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la Himno. Li estus tre kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laeble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritaj, malfortaj, senkoloraj.

Tiuj du antipodoj, vere, akre batalas inter si, de kiam ekzistas la lingvo. La unuaj riproĉas, ke la neologismoj malfaciligas, konfuzas, kaj fine pereigos la lingvon, argumentas per la orientanoj, kiuj ne konas la vortojn pruntitajn el la Europaj lingvoj. La duaj riproĉas, ke la konservativa partio volas ŝtonigi la lingvon, bari ĝian evoluon, trudi al ĝi malriĉon kaj senornaman simplecon."

Por povi orientiĝi en tiu ĉi kverelo, Kalocsay konsilas rigardi, kiel solvis ĉi tiun dilemon Zamenhof, "la plej grandskala propagandisto kaj literaturisto en la sama persono".

"Li donis la trunkon de la lingvo en la Universala Vortaro de la Fundamento. Per tio li fiksas la vortprovizon vulgaran, kiel eble striktan, sed nepre necesan por ĉiu esperantisto. Kaj, poste, tiel trankviliĝinte pri la unueco kaj neŝanĝebleco de la lingvokerno, kiel literaturisto li tute ne avaris pri la kreo kaj liberala akcepto de novaj radikoj, tiel ke la Zamenhofa radikaro de Wuster enhavas proksimume du milojn da ili, ĝis nun ne oficialigitajn."

Kaj ankoraŭ Kalocsay - -

"La esperanta literaturo nerezisteble kunportas la riĉigon de la vortprovizo. Ĝi kreas novajn radikvortojn anstataŭ kunmetaĵoj, novajn vortojn por mankantaj esprimoj de nuancoj. Se oni apartigas la vulgaran, au lernolibran vortprovizon, tute ne estos plu danĝera la liberala oficialigo de ĉi tiuj novaj vortoj, precipe, se oni markas per speciala signo, ke ili estas poeziaj vortoj.

Jen ekzemple kelkaj zamenhofaj, ne fundamentaj vortoj, kiujn ne naskis nepra neceso, per kiuj la Majstro volis eviti kunmetaĵojn kaj derivaĵojn. Abismo anstataŭ profundegaĵo, ferio anstataŭ libertempo, giganto anst. grandegulo, kalva anst. senhara, festono anst. florplektaĵo, karambolo anst. kunpuŝiĝo, angoro anst. korpreniteco, auroro anst. tagiĝo, sino anst. trunkantaŭo.

Poste, jam ĉe Zamenhof, sed ankoraŭ plie ĉe Grabowski, oni vidas certan tendencon por la iompostioma malpliigo de la malvortoj. Ĉe Zamenhof ŝtulta anst. malsprita, aflikti anst. malĝojigi, milda anst. malsovaĝa, ĉe Grabowski humida anst. malseka, aperti anst. malfermi, disipi anst. malŝpari, noci anst. malutili, fora anst. malproksima, neglekti anst. malzorgi montras ekzemple ĉi tiun tendencon.

Oni do devas ne miri, ke tiuj tendencoj daŭras plu en la lingvo, kaj aperas ŝtumbli anst. falpuŝiĝi, langvoro anst. animalstreĉiĝo, nupto anst. geiĝo, svelta anst. gracitalia, rara anst. malofa, audaca anst. riskemega, eĉ, lastateme trista anst. malĝoja.

Sed kompreneble, ĉi tiun evoluon oni devas iel bridati. Unua regulo: ĉiu oficiala radiko estas neŝanĝebla. Dua regulo: novajn vor-

tojn enkonduku nur, kiu funde konas la lingvon, konas lingvojn krom la sia, havas vigan lingvosenton, senton pri la gusto de Esperanto kaj ĉion ĉi li provas per valora verko originala, au tradukita, kiu lin montras majstro de la lingvo. Tia verkisto certe konscias sian respondecon kaj je neologismo sin decidigas nur post fundaj konsideroj, konsulto de ĉiuj bonaj vortaroj, do en okazo de nepra neceso. Aliparte, oni devas allasi, ke ĉi tiu arta neceso estas pli larĝa, ol la neceso pure lingva."



kion skribas Edwin de Kock en la artikolo La Régula Stafeta kaj la originala Esperanta poezio en la libro Serta Gratulatoria, eldonita en La Laguna 1987:

"Kiam J. Régulo amis libron - kaj tio okazis preskaŭ ĉiam - li faris sian tutan eblon, ke ĝi aperu inde, ne nur fizike sed laŭkvalite. Ekzemplas Romeo, Julieta kaj la Tenebro, kies tekston li trovis ne sufiĉe kontentiga. Kun la permeso de la tradukinto, li mem entreprenis la plibonigon. Li venigis tiucele eldonon de la originala Ĉeĥa, lingvo kiun li ja ne konis, kun tradukoj en kaj la Itala kaj la Franca. Komparante la Esperantan version de la manuskripto kun la tradukoj rilate al la Ĉeĥa, li grave plivalorigis ĝin."

Tiom Edwin de Kock. Li takte prisilentis, ke temas pri la traduko de V. Vána. Do la poezio, la prozo, la traduko. Mi persone dankas al Baghy pro multo. Baghy restas mia neforgesebla instruisto. Sed koncerne Kalocsayon li principe eraris. Hodiaŭ tio estas klara al mi. Hodiaŭ mi vidas mian ŝancon en tio, ke mi streĉe kontaktas kun niaj famaj ĉeĥaj nacilingvaj poetoj kreantaj ankaŭ en esperanto, Jiří Karen kaj Josef Rumler, anoj de la Asocio de ĉeĥaj verkistoj. Ni kunlaboras sur la tereno de la artiliteratura sekcio de la Ĉeĥa

Ĝis ĉi tie Kalocsay. Agnosku, ke estis utile reveni al li. Ĉar la lukto inter la konsekvencaj skemistoj kaj la senskrupulaj progresantoj interne de la movado daŭras. Jen reflektado de la du tendencoj propraj al la evoluanta lingvo. Mi diris lukto. Kvankam en la lingvo mem temas pri fortoj ne inter si batalantaj, sed reciproke komplementaj. La kontraŭstaro de la skemistoj estas nur sekvo de la nekompreneco de tiu ĉi dialektika procezo en la lingvo, kiu devas plenumi diversspecajn taskojn de la homara interkomunikado. Procezon fakte naturan kaj sanan. Domage, ke al niaj dialogoj ofte mankas necesa toleremo.

Mi returniĝu al mia kreado. La cirkonstancoj - versaĵe en la ĝusta tempo - kondukis min al la prozo kaj eĉ al la traduko en esperanton. Mi konstatis: verki proze estas neniel pli facila ol akŭŝi poemon. Plue - ankaŭ la traduko estas arto, ne nur grandega kaj respondeca laboro. Aŭdu,

Esperanto-Asocio. La sekción fondis Karen en la jaro 1981. Kvankam niaj ebloj publikigi ne estas optimumaj, la agado de la sekcio okazas sur la artisme profesia nivelo. En esperanta presoj oni povas renkonti eĉ kun la indiko "praga artliteratura skolo". Nu, bone, tamen erst la futuro valorigos nian efektivan kontribuon. Koncize - ni ne vidas en esperanto nur ian helpan lingvon, nur universalan komunikan rimedon, kiu ebligas al la homoj la bazan interkompreniĝon. Ni celas, ke esperanto egaligu al la naciaj lingvoj, konkrete ke estu al nia dispono la same riĉa vortaro, en kiu oni sekure trovas ĉion bezonan, vortaro, en kiu estos registritaj ĉiuj vortoj en esperanto ĝis nun uzitaj, ĉiuj internaciaj esprimoj, vortaro, kiu kovrus la mondon de la objektoj, nocioj, rilatoj, kiu enhavus la tutan gamon da sinonimoj, ĉar sen la sinonimoj ne povas ekzisti arta stilo... Tio tute ne signifas, ke ni devus ilin uzadi ĉiutage ĉu en parola, ĉu en skriba kontakto. La fakaj terminoj ankau normale ne uzatas. Kaj plu tio ne signifas, ke ni kiel aŭtoroj disipus per ili tiagrade, ke niajn kreaĵojn fine neniu komprenus. Cetere vera artisto scias difini la mezuron de uzitaj neologismoj. Ja eĉ tio pravas lian artisman kapablon.

Jes, la vortaro. Nepre ne temas sole pri la tasko de la lingvistoj. Temas egale pri la tasko de la literaturscienculoj. La lingvajn problemojn enkadre de la arta literaturo oni devas vidi ne izolite, sed en la tuta larĝeco, en la konekso al la artliteratura kunteksto. Ĉe ni en Prago en la epoko inter la du mondmilitoj ligis siajn sciencajn konojn la eminentaj lingvistoj kun la literaturaj scienculoj kaj rezolute rifuzis la ĝisostajn opiniojn de la sinjoroj lingvistoj el la malnova skolo, kiuj la verkistojn klasifikis per notoj kiel etulojn en la lernejo. Oni forgesas, ke ĝuste la verkistoj grave influis, influas kaj influos la disvolvon de ĉiu lingvo.

Doktoro Detlev Blanke pardonu al mi, sed tio, ke li kvalifikas Piĉon kiel psikopaton, memorigas al mi ĝuste tiun malnovan skolon de la iamaj pragaj lingvistoj - pedantoj. Lia ofendo tuŝanta honoron pravas, ke li absolute ne rekonas la artisman lingvaĵon de Piĉ. Blanke elŝiras la esprimojn de Piĉ el la artisma kunteksto kaj per tio krude senfunkciigas ilin. Kaj kun la pensoj de Piĉ li faras la samon. Se Piĉ verkas eseon pri la lingvo, temas pri ĝenro de arta literaturo kaj ne pri faka traktaĵo scienca. D-ro Blanke, nepre renomata lingvisto, ŝajnas al mi ne sufiĉe ekipita por respekti Piĉon kiel artiston, kiu helpe de poezia hiperbolo asertas, ke esperanto rapide evoluas kaj ŝanĝiĝas restante tamen ĉiam la sama. Nur tial povas Piĉ al Blanke montriĝi "psikopato" kaj ni, profesiaj literaturistoj, eble "praga kliko de lingvofuŝantoj". Kiel mi jam diris, estas necese vidi kaj taksati la problematikon de la lingvo komplete, vidi la lingvon en ĉiuj ĝiaj funkcioj inkluzive la funkcion estetikan, kiu en la beletro dominas. D-ro Blanke ŝatas emfazi - kaj ĝuste - ke la lingvo estas socia fenomeno, tamen en la artikolo presigita en la revuo Esperanto, en kiu li kritikis la agadon de la Akademio de Esperanto kaj proponas ĝian reformon, li paradokse super-taksas la taskon de la sciencisto lingvisto koncerne la kontrolon de la lingva evoluo. En praktiko ĉiu siamaniere kontribuas al la lingvo - laboristo, sportulo, turisto, studento, sed ankau fakulo, scienculo kaj certe ne en la lasta vico ankau verkisto. Finfine al

Blanke je lia kritiko rilate la agadon kaj destinon de la Akademio konkrete respondis kolego Albault.

Ni el la praga artiliteratura sekcio, aŭ se vi volas, el la praga artiliteratura skolo, penas disvolvi la heredaĵon de Kalocsay paralele kun aliaj progresemaj literaturaj centroj de la nuntempa beletra esperanto, ekzemple kun tiu de Hauptenthal, De Diego, Vatré kaj aliaj el la Iltisa skolo en Sarlando kaj kun la grupo ĉe la Literatura skolo en Sevastopol. Niajn opiniojn pri la bezono de riĉa sinonimeco, elirantaj el nia ĉiutaga artiliteratura praktiko, teorie formulis Josef Rumler en sia eseo Koncepto pri la diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la esperanta leksiko. Eseo publikigita en la kalendaro Abunde kaj redunde eldonita en Prago 1986 kaj reaparinta en la Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo en La Laguna 1987. Eseo ŝoka por multaj esperantistoj. Ŝoka ne tiom pro la koncepto mem, sed pro la aldonita Neologisma glosaro. Kiu tamen en la plejmulto ripetas la vortojn de la Neologisma Glosaro de Vatré, eldonita jam la duan fojon kiel neoficiala aldono al la PIV /kunlabore kun la ĉefa aŭtoro de la PIV Waringhien/, en kiu precipe temas ne pri vortoj novaj, sed pri la vortoj uzitaj de Zamenhof, Grabowski, Saussure /Antido/, Schulhof kaj notitaj de pluraj vortaristoj en la pionira epoko de nia lingvo. Ni menciuj almenaŭ la nete Zamenhofan men /malpli/, la vorton kozo /aĵo/ de Grabowski, la vorton despero /mal-espero/ de Schulhof 1911, la vorton fakelo /torĉo/ de Kabe, la sufiksojn -oz, -iv, -atra de Saussure, la vorton forsan /eble/ kaj la formon iŝi /feminina formo al maskulina aŭ komuna ili/ de Grosjean-Maupin 1907 ktp. Domage, ke en la PIV ne estas registritaj ĉiuj vortoj de Zamenhof. Mankas da ili centoj. La kauzo - por multaj vortaristoj longe validis la devizo "unu vorto - unu signifo", kvankam ĝia falseco estis pruvita jam antaŭ kvindek jaroj. Pri tio ĉio oni povas legi en la Plena Analiza Gramatiko. Antaŭ nelonge rememoris tion en la gazeto Esperanto kolego Duliĉenko, lingvistika profesoro ĉe la universitato de Tartu en Estonio. Mi citas:

"Esperanto montris, ke ekzemple la dekomence deklarita principo "unu vorto - unu signifo" estas plene nerealigebla, ĉar aktiva "viva" funkciado de lingvo postulas multsignifon de vortoj, evoluon de sinonimeco, pli heterogenajn esprimformojn de antonimaj rilatoj ktp., t. e. por Esperanto kiel ankau por ĉiu etna lingvo necesas ne nur principo de lingva sufiĉo, sed ankau principo de lingva superfluo. Pri tio skribis jam en 1931 la konata interlingvisto Ernest Drezen en sia verko Skizoj pri teorio de Esperanto."

Tiom Duliĉenko. Do nia praga devizo "abunde kaj redunde", valida speciale por la stilo beletra, artiliteratura, neniel troigas, sed nur objekte karakterizas la specifan leksikan tendencon, la autonoman lingvajan principon komunan al la poezio, al la arta prozo kaj al la eseo. Simile la demando pri la proponata uzo de la akuzativo post "de", kie temas pri la objekto post la agosubstantivo, estas nenia elpenaĵo de Rumler aŭ de la praga skolo, sed la temo, pri kiu tre serioze parolas la Plena Analiza Gramatiko. Nuntempe aplikis tiun ĉi manieron ankau la komputera sistemo de esperanto kiel la por si necesan diferencigan gramatike precizigan, "logikan" solvon.

Elirante el la spertoj pri la neceso de sinonimeco kiel kondiĉo por ekzisto de iu ajn stilo, Rumler adaptis kaj aplikis la ĝeneralan teorion pri la diversaj stiloj en la lingvo konkrete al esperanto.



Tiu disdivido de la vortprovizo /leksiko/ en la unuopajn funkciajn stilojn /komunuzan, fakan kaj beletran/ ebligas al ni en Frago orientiĝi en la elekto de trafaj vortoj. Sinjoro Golden kaj aliaj hezitas inter la diversaj formoj: ĉu komputilo, au komputero, au komputuro. Kial tiu embaraso? Ĉar mankas al ili la teorio, la koncepto. Ili opinias, ke nur unu formo estas la ĝusta por la tuta lingvo. Kaj en tio ili eraras. Ĝia nia koncepto pri la diversaj stiloj, formulita de Rumler, estas al ni klare, ke en la komunuzata stilo oni povas uzi la formon komputilo au pli precizan komputero /lau PIV/, la samon oni povas apliki en la stilo artliteratura, dum en la stilo faka estas kompetenta la formo komputoro, ĉar -oro estas specifa faka sufikso, kiel informas nin la Terminologia kurso fare de Jan Werner.

Post tia cerbumado konvenos bomboneto. Mian kolegon akademianon Piĉon oni kalumnias, insultas, damnas, tamen neniu forgesas eble eĉ plurfaje legi lin. Vin certe interesos lia letero adresita al Rumler:

"Estimata samideano, dankon por la Matena melkado. En viaj poemoj esperanto trovas novan dimension kaj ian novan vivecon. Tio cetere validas eĉ pri via Abunde kaj redunde, kiun mi legis kun granda ĝuo. Abunde kaj redunde estas ja ĉiutaga vivo kaj praktiko de ĉiu kultura lingvo. Kaj la panikoj de Stanuroj kaj similuloj nur montras, ke ili vivas en artefarita vakuo: absolute ekster la vivo kaj realo! Al la sama kategorio apartenas la Vortoj de malnova esperantisto far E. Vána en Esperantisto Slovaka 2-1987. Bedaurinde mi estas notora idioto, ĉar mi iel ne vidas, en kio niaj novismoj "lezas la Fundamenton". Verŝajne en tio, ke ili estas - novismoj. Senelireja cirklo! Kvankam envere, nur malmultaj vortoj el ĉiuj, kiujn ni propagandas, estas efektivaj neologismoj. Ĉar preskau ĉiuj aperis jam en la fruaj jaroj de esperanto, ankoraŭ inter 1890 -1914, kaj la aliaj en la dudekaj kaj tridekaj jaroj. Do prave vi akcentas tion en la antaŭparolo, per kiu vi pravigas la Sinoniman Neologisman Glosaron."

Tiel Piĉ, vole-nevole, nia plej interesaj kaj same plej diskutata esperanta verkisto - kaj por kaj kontraŭ. Fine ni ankoraŭ revenu al la patro de nia lingvo, al Zamenhof. Ni revenu ne nur al liaj dek ses reguloj, por kies ekspliko hodiaŭ ne sufiĉas eĉ la septpaĝa Plena Analiza Gramatiko, sed al lia praktiko, al liaj propraj tekstoj. Ni observu, kiel li tie aplikas la 15-an regulon kaj kiel li mem kondukas rilate al ĝia dua limiga parto. Estis jam dirite, ke en la PIV mankas centoj da liaj autentaj vortoj. Tio nepre ne estas en ordo. Ĉiuj Zamenhofaj vortoj devus esti en tia granda vortaro registritaj. Kaj ankau la vortoj de la ceteraj korifeoj de la esperanta literaturo. Tamen koncerne konkretajn ekzemplojn de Zamenhofa uzado de naturalismoj, je tiuj la PIV vere riĉas. Montrigas, ke Zamenhof ne hezitis kaj abunde eluzadis ilin pro ilia kompreneblo por ĉiuj. Eĉ kontraŭ la prezo de la malobeado la duan parton de la 15-a regulo. Li komprenis tiun parton rekomendinda, sed nenikaze kiel ordonon, leĝon, kiu devus bremsi la naturecon de la internacia lingvo. Sufiĉas rememori la Zamenhofajn reportero, dikta-to, deismo, teokratio. Li ne vidis en ili ian lezon. La uzado de ero en la signifo epoko, jes, ero, ne erao, jen la plua ekzemplo el vere longa vico da Zamenhofaj naturalismoj. La pledantoj por la ske-

misma unuflankeco de nia lingvo afable konsideru tion.

Estimataj! Kvankam fizike absenca, fora, mi sentas min antaŭ vi lingvistoj iom kvazau antaŭ la tribunalo... La hetajron Frinan oni amnestiis pro ŝia nekutima belo. Mi provos emociigi vin per miaj kelkaj versoj:

Ja estis peza vino,  
kiun ni triĝkis kune.  
Flamruĝa laŭ koloro,  
laŭ gust' tre dolĉa, ĉu ne?

Ni tostis... Du pokaloj  
ektintis pro la ĝojo...  
Trinkite - ĝis la fundo.  
Aĥ, je kioma fojo?

Kaj pasas tag' post tago  
en vico senvaria  
kaj jen anstataŭ sobri  
mi estas plu ebria...

Ne volas trankviliĝi  
la pulseganta sango.  
Mi pezan vinon sentas  
ankoraŭ sur la lango...

# KONVERSACIO por progresintoj



Deksepa temo: F L A Ŭ R O

Flaŭro estas vegetaĵaro de certa teritorio, epoko aŭ sezono. Florantaj vegetaĵoj havas en la tero radikojn, bulajn bulbojn - aŭ malpli grandajn rizomojn. Super la tero estas ligneca trunko aŭ verda sukosa tigo. Sur la tigo estas verdaj folioj. Se la folioj kreskas rekte de la tero, do la tigo sen folioj nomigas pedunklo. Folio havas petiolon kaj diversforman limbon. En verdaj folioj estas klorofilo, kiu kapablas per sunaj radioj ŝanĝi la aeron karbondioksidon al oksigeno. Supre estas sur vegetaĵoj floroj, kies koloroj kaj odoroj allogas insektojn. En floro estas stameno, kiu enhavas polenon. Tio estas fruktiga polvo, kiu la insekto disportas. Pistilo estas organo de floro, el kiu poste estas fruktoj. La homoj ellernis kulturi aŭ kultivi kelkajn vegetaĵojn. Ili plantas ilin, semas, greftas, surverŝas per akvo, sarkas herbaĉojn kaj rikoltas fruktojn per falcado aŭ plukado. Nova plantaĵo komence germas.

Arboj estas grandaj vegetaĵoj kun fortikaj trunkoj kaj multaj branĉoj. La tuto da branĉoj, precipe kun verdaj folioj, nomigas krono. Kelkaj arboj havas pinglofoliojn, ili nomigas koniferaĵoj: abio, lariko, piĉeo, pino. Aliaj arboj havas foliojn, kiuj estas somere verdaj, aŭtune ili flavigas, sekigas kaj defalas. Acero, alno,

betulo kun blanka trunka krusto, fago, frakseno, karpeno, kaŝtano kun belaj brunaj fruktoj, fortika kverko, svelta poplo, saliko sur bordoj, tilio, tremlo, kies folietoj tremas eĉ per venteto kaj ulmo estas plej konataj foliaj arboj. Aliaj arboj donas dolĉajn fruktojn: flava abrikoto, ruĝa iam acida ĉerizo, malmola juglando, marono: mangebla kaŝtanfrukto, harena persiko, specialforma piro, ronda pomo, blua pruno, pli granda renklodo estas nomoj de kelkaj fruktoj. Glano estas nemangebla frukto de kverko, strobiloj estas fruktoj de koniferaj arboj. Cikaso kaj cipreso ne estas oftaj arboj en Eŭropo similaj al koniferaj, eukalipto estas arbo en Aŭstralio, palmoj estas arboj de tropikaj landoj, kies fruktoj estas diversaj, plej ofte mangeblaj: suka ananaso, flava banano, acida citrono, dolĉa figo, malmola karobo, simila daktilo, komence maldolĉa migdalo, speciale flava orango. Ŝekojo estas tre alta arbo, taksuso estas arbeto. Arbedo estas vegetaĵo, kies ligneca trunko estas malalta. Arbusto preskaŭ ne havas trunkon, nur verdajn branĉojn. Berberiso havas rugajn, agrable acidajn berojn, eriko formas tutajn erikejojn, hedero riĉe plenigas la surfacon per siaj folioj, juniperaj beroj aromigas brandon, kratago havas blankajn florojn, lauro estas konata el olimpiaj ludoj de antikva Grekio, sambuko havas blankajn florojn, el kiuj oni pretigas ŝvitigan rimedon, rozo havas pikajn dornojn, siringo aŭ lilako havas blujajn aŭ similkolorajn belodorantajn florojn en majo. Aliaj arbustoj estas sorpo kaj tamariko. Kelkaj kreskaĵoj kreskas rekte de la tero. Iam homoj havas ilin antaŭ fenestroj en radikuloj. Agrostemo kaj blua ceĵano kreskas sur kampoj inter grenherboj kiel herbaĵoj. Azaleo, begonio, fuksio kaj hiacinto estas tipaj radikulaĵoj. Dalio floras autune kiel kolĉiko, dianto floras en junio. Helianto estas scienca nomo de sunfloro. Kaktaj kardo kun pikaj dornoj ne bezonas tro malsekan teron, kontraŭe kalto kreskas en ŝlimo kaj nimfo rekte en akvo. Leontodo estas flava ciestanta floro. Krizantemo kaj lekanto estas similaj kun multaj floraĵoj folietoj. Same similaj estas levkojokaj violoj. Lilio kaj mirto estas floroj por fianĉinoj. Miozoto, peonio, narciso kaj primolo estas malgrandaj herbejaj floroj. Papavo estas ruĝa kaj blanka, el kapsuloj estas medicinaj suktoj. Tulipo estas konata precipe el Nederlando. Konvalo bele odoras. Floro de kampanulo similas al sonorileto. Kamomilo liveras resanigan teon. Trikoloreto estas floro por herbobedo kaj radikulo. Galanto estas frua printempa floro. Al grenherboj apartenas: aveno, hordeo, maizo, milio, sekalo kaj tritiko. El lupolo estas biero, oni uzas ankaŭ hordeon, kano havas diversan eluzon. Kanabo kaj lino liveras teksaĵojn. Legomoj estas uzataj por kuirado. Ajlo kaj cepo havas pikantan guston, asparago kaj laktuko estas almanĝataj. Brasiko, florbrasiko kaj sabeliko estas origine sama kreskaĵo. Karoto estas ruĝa kiel rafano, kreno estas pinĉa, kukumo acida, petroselo, poreo kaj ŝenoprazo pligustigas supojn. Beto, kukurbo, naĵo kaj rapo estas almanĝataj. Celerio estas aŭ verdaj folietoj aŭ radikoj por supoj. El kreskaĵoj devenas ankaŭ diversaj spicoj: dolĉa cinamo, ilicio, karlofilo, kumino, kapsiko aŭ papriko, pipro, safrano, zingibro. Aneto estas uzata por saucoj, cikorio kiel ingredienco al kafajo. Tomato estas ruĝa sukoza frukto. Al legumenaĵoj apartenas fabo, fazeolo, lento kaj pizo. Kelkaj estas en guŝoj. En arbaroj kreskas multaj fruktoj: rugaj fragoj kaj framboj, blujaj mirteloj, nigraj aŭ ruĝaj vakcinioj. En ĝardenoj estas flavaj kaj ruĝaj riboj, dornetaĵoj grosoj, en kampoj estas rubusoj kaj pruneloj. Malmolaj estas aveloj. Por dombestoj oni kulturas sur herbejoj luzernon, medikagon kaj trifolion. Sekigita herbo estas fojno. Anasoj

mangas urtikojn, kies folioj brulvundas. Lemio estas simila, sed la folioj ne vundas. Ĉevaloj mangas furagon kaj vicion.

Vegetaĵoj neflorantaj estas parazitaj, ili havas nek florojn, nek fruktojn, nek semajn. En akvo estas algoj, sur la tero estas ekvizetoj, filikoj, likenoj, likopodioj, simoj, kiuj aperas precipe en malsekaj lokoj. Sub arboj kreskas musko, sur arboj aperas visko, simbolo de kristnasko. Kelkaj fungoj estas manĝeblaj. Plej konataj estas boletoj, flavaj estas kantareloj, agarikoj kaj trufoj povas kreski eĉ en keloj. Amanito estas veneniga.

Homoj kultivas kreskaĵojn pro utilo aŭ pro ornamo. Ili kultivis kelkajn kreskaĵojn tiel, ke ili tre diferencas de sovagaj specoj. Ili havas kampojn kaj ĝardenojn, kie estas herbobedoj, ili konstruis vitrodomojn, plantvarmejojn, ili kultivas kreskaĵojn en nutraj likvaĵoj. Tio estas hidroponio. Pro ornamo ili kultivas diverskolorajn florojn, kiujn oni poste ligas en bukedoj. Multaj floroj aŭ aliaj kreskaĵoj estas simboloj de kelkaj ecoj, de kelkaj landoj aŭ de kelkaj homoj. Scienco pri kreskaĵoj nomigas botaniko, ekzistas botanikaj ĝardenoj, homoj bezonas kreskaĵojn kaj ne povas permesi, ke la malbona aero difektu ilin.

---



E

---

#### GRAMATIKO:

1. En la teksto estas jen nomoj de kreskaĵoj, jen nomoj de fruktoj. Diru ekzemplojn kaj menciu, kiuj estas kreskaĵoj, kiuj fruktoj, ĉu ekzistas sufikso por esprimi tiujn rilatojn.
2. Kion vi scias pri tiu sufikso? Ĉu ĝi havas nur tiun signifon?
3. Kio estas herbaĉo? Diru aliajn vortojn kun tiu sufikso kaj uzu ilin en frazoj.

#### STILO:

1. Priskribu al via eksterlanda amiko la flaŭron de via lando.
2. Se vi havas ĝardenon, skribu pri ĝi. Alikaze skribu pri eluzo de legomoj, aĉetado, graveco por nutrado.
3. Skribu pri la graveco de terkulturado.

#### DEMANDOJ:

1. Kiujn arbojn vi precize konas?
2. Kiujn aliajn kreskaĵojn vi precize konas?
3. Kiel utilaj estas la kreskaĵoj por nia vivo?
4. Kion vi scias pri la esprimado per floroj? Diru plurajn ekzemplojn?
5. Ĉu vi povas nomi simbolojn, en kiuj temas pri floroj, arboj aŭ aliaj kreskaĵoj?
6. Ĉu vi konas blazonojn kun kreskaĵoj?

Josef Chvosta

# ĈAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

## 11. Klasifikado

Krom la lingvoj, pri kiuj ni jam parolis, ekestis ankaŭ multaj aliaj, onidire preskaŭ mil projektoj. Tial aperis en la interlingvistiko bezono klasifiki la lingvojn.

Ĉiujn homajn sistemojn de komunikado, artefaritajn samkiel la naturajn, eblas dividi je pazigrafioj /internaciaj skriboj/, gest-lingvoj kaj pazilalioj /sonlingvoj/. Al pazigrafioj apartenas ankaŭ la trafiksimboloj, diversaj simboloj sur aparatoj /rigardu vian televidilon!/, kemiaj kaj matematikaj formuloj, muziknotoj k.s. Aperis provoĵ krei internacian bildlingvon /J.Effel/ aŭ uzi kiel bazon de pazigrafio la ĉinajn signojn, egiptajn hieroglifojn aŭ arabajn ciferojn /1047 = maljuna; 9 = igi; 1047-9 = maljunigi/.

La gestlingvojn uzas precipe la surdmutuloj; temas pri lingvoj naturaj, kiujn la surdmutuloj kreis similtaniere kiel la aŭdantoj kreis la sonlingvojn. Ne ekzistas natura universala gest-lingvo. La uzantoj de la gest-lingvoj usona, brita, franca, ĉina, japana aŭ ekzemple sveda ne interkompreniĝas sen interpretistoj. Sole en kelkaj sportoj ekzistas internacie interkonsentitaj gestoj de ludgvidistoj, sed per ili oni povas transdoni nur tre limigitan kvanton de ideoj. La prvoj formi internacian gest-lingvon restis sen konsiderinda reeno, ĉar per tiuj lingvoj, simile kiel per pazigrafioj ne eblas komuniki telefone, en mallumo, ili havas multajn malavantaĝojn, malgraŭ kiuj ili estas preskaŭ same komplikaj kiel la sonlingvoj. Ilia vortprovizo estas tre limigita.


La internaciajn sonlingvojn eblas dividi je pluraj specoj. Unue temas pri la vivantaj naturaj mondlingvoj /angla, franca, rusa, hispana, germana, araba, ĉina, haŭsa k.s./, mortaj naturaj mondlingvoj /latina, malnovgreka/, plus iliaj simpligitaj komercaj versioj, piĝinoj /el la kriptigita angala vorto "business" - komerco/, kiuj estigis precipe en kolonioj en grandaj urboj, komercaj centroj, kien venas diversnaciaj europanoj kaj indigenoj. Ili komencas interkompreniĝadi per ia miksaĵo de europaj kaj indigenaj vortoj; la indigenoj prononcas la europajn lingvon siamaniere kaj uzas sintakson de siaj lingvoj. La piĝinoj ekestas ne nur el la angla, franca, portugala, sed ankaŭ el la hinda, malaja, svahila k.a. Kiam piĝino igas patrolingvo por siaj uzantoj, oni parolas pri kreoligita lingvo. Sur Jamaiko oni parolas kreoligitan anglan, sur Haitio kreoligitan francan. La kreoligitaj lingvoj evoluas kaj ricigas, ili fariĝas plenvalorej rimeĵoj de komunikado kaj pensado. En kolonioj oni provis uzi ankaŭ la t.n. minimum-lingvojn /Basic-lingvojn/, tio estas nur elektoj de plej gravaj vortoj el certa nacia lingvo. En 1930 C.K.Ogden prezentis sian projekton de simpligita angla /Basic-English/, konsistanta el 850 vortoj. En ĝia gramatiko estas permesitaj eĉ tiaj formuloj, kiuj en la normale lingvo ne eblas /ekz. fari ne esti = mortigi, detruiri, nenigi/. Ogden volis enstrudi sian projekton al indigenoj en la britaj kolonioj kaj plifortigi tiamaniere la pozicion de la angla.

Alian grandan grupon de internaciaj sonlingvoj formas la lingvoj artefaritaj, nomataj simple planlingvoj. Kiam iliaj vortoj estas tute elpensitaj, temas pri lingvoj aprioraj /a priori = laŭ racio, sen sperto/, se la vortoj estas transparentaj el la naturaj lingvoj, oni parolas pri projektoj aposterioraj /a posteriori = laŭ sperto/. Sed ankaŭ en la aposterioraj lingvoj kutime estas kelkaj vortoj elpensitaj, tial eblas nomi ilin projektoj miksaj. Ekzemple Solresol estas lingvo apriora, Interlingua aposteriora, Volapuko kaj Esperanto miksaj. Laŭ la prilaboro de la internaciaj vortoj oni distingas lingvojn naturalismajn kaj skemismajn. La naturalismaj /Interlingua, Occidental-Interlingue/ klopodas konservi la klasikajn formon kaj ortografion de la internaciaj vortoj, dum la skemismaj /Esperanto, Novial/ donas al la vortoj fonetikan ortografion /laŭ la principo: skribu, kiel vi aŭdas/ kaj la derivaĵojn ili formas regule laŭ certa skemo. Ambaŭ grupojn eblas dividi plue: projektoj hipernaturalismaj /hiper = super/ strebas imiti la naturajn lingvojn en plej granda ebla grado /Interlingua/, la hiponaturalismaj /hipo = sub/ permesas pli multe da artefariteco /Occidental/, la hiperskemismaj /Esperanto/ havas maksimuman skemecon, dum la hiposkemismaj /Novial/ estas malpli skemecaj.

En ĉiuj lingvoj, naturaj kaj artefaritaj, oni renkontas formojn analizajn /igi maljuna/ kaj sintezajn /maljuniĝi/, do tendencojn dismeti kaj kunmeti la vortojn. La polisintezaj formoj kunmetas plurajn plensignifajn radikojn /akvo-falo, leter-portisto, poŝ-vortaro/. La cena apartenas al la lingvoj, en kiuj supernombros la formoj sintezaj, sed en la angla kaj ĉina dominas la elementoj analizaj. La polisintezaj vortoj estas karakterizaj por la germana /Strassen-bahn-halte-stelle-paper-korbe-paperkorbo ĉe tramhaltejo/. Ekzistas indianaj lingvoj, en kiuj la tuta frazo estas fakte unu granda vorto. La sintezaj lingvoj povas esti fleksiaj kaj aglutinaj. En la fleksiaj ŝanĝigas vortradiko ĉe la deklinacio, konjugacio aŭ derivado /vidu en la ĉeĥa: přítel-přátelė, nést-nosit-přinášet, číst-čtu/, la sama finaĵo havas diferencajn signifojn /peĉu pánu husu - mi roŝtas por sinjoro anseron/ aŭ male la sama signifo ĉe diversaj vortoj estas esprimata per alia finaĵo /ekzemple akuzativo en la ĉeĥa: muže, pána, ženu, nůši, město, stavení/. La aglutinaj lingvoj /ekz. la hungara, turka, gruzaj/ havas male la vortradikon sensangan kaj algluas al ĝi /aglutinas/ afiksojn kun preciza signifo. Ekzemplo el la turka: ev - domo, evler - domoj, evim - mia domo, evlerim - miaj domoj, evde - en domo, evlerde - en domoj, evimde - en mia domo, evlerimde - en miaj domoj. Simile eblas klasi ankaŭ la planlingvojn. La hipernaturalisma Interlingua estas lingvo fleksia /responder - responsa/, dum la hiperskemisma Esperanto estas lingvo aglutina /respondi - respondo/.

Nian malgrandan ekskurson tra la interlingvistiko ni povas fini. Ni vidis, ke jam multo estis farita kaj ankoraŭ multo restas por esti farita.





# KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

Gesparantistoj (20-70) el Pollando deziras korespondi tutmonde por interkomprenigi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Adreso: Polski Związek Esperantystów, 33-100 Tarnów, skr. poczt. 79, Pollando.

28-jara sekretariino, ŝzino, interesiĝas pri vojaĝoj, naturo, beletro, modo, filmo, medicino kaj lingvistiko, kolektas poŝtkartojn, bankbiletojn, suveniroyjn, mod-magazinojn, gramofondiskojn, kasedojn. Bronisława Zawadzka, ul. Stara 2 m 4, PL 41-703 Ruda Śląska 3, woj. Katowice, Pollando.

15-jarulo interesiĝas pri sporto kaj muziko, serĉas amikojn: Edwin Furmaniak, Lisew 15, 63-210 Zerków, woj. Kalisz, Poll.

27-jara instruisto interesiĝas pri vojaĝoj, fotografio, motoroj kaj sporto. Josef Lechowicz, ul. Z. Chrzanowskiej 6, 56-100 Wolów, Pollando.

Korespondi kun iu el Ĉeĥoslovakio deziras Bogusława Szytkonska, Rseplino 54, 73-116 Kolin, woj. Szczecin, Pollando.

27-jara eksstudento deziras havi amikon en Ĉeĥoslovakio. Marek Warmuz, os. Bohaterów Wrz. 59/52, 31-621 Krakow, Pollando.

Mezaga pola esperantistino, konservistinino (renovigistino) de antikvaĵoj, interesiĝas pri belaj artoj, muziko, poezio, vojaĝoj kaj kulturo de diversaj landoj, ŝi ludas pianon kaj apartenas al esperanta virina koruso "Eho".

Ewa Biaiewicz-Matwiji, ul. Zamenhofska 1/3 m 24, 90-431 Łódź, Pollando.

47-jara ingeniero volas korespondi kun ĉeĥaj geamiko, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, satas vojaĝi. Lia 9-jara filo Jacok ankaŭ intencas lerni Esperanton. Adreso: Leon Chodera, 03-214 Waresawa, ul. Krasnobrodzka 17 m. 190, Pollando.

26-jara fraŭlino serĉas korespondanton. Bogumila Niechciał, ul. Orzeszkowej 20, PL-47-100 Strzelce Opolskie, Pollando.

Korespondi tutmonde volas Edyta Urtnowska, ul. 10 Lutego 13/1, 86-100 Świecie n/W, Pollando.

24-jara instruistino interesiĝas pri turismo kaj muziko, kolektas bildkartojn, Adreso: Jolanta Stencel, ul. Grenadierów 25/27 m. 57, 04-052 Warszawa, Pollando.

30-jara laboristo interesiĝas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas bildkartojn. Adreso: Krzysztof Zaro, 87-600 Lipno, str. Łączna 31, Pollando.

25-jara oficistino laboranta en poŝtofero interesiĝas pri literaturo kaj brodato, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Bożena Golonka, ul. L. Wenedy 11/27, 30-833 Kraków, Poll.

17-jarulon interesiĝas la vivo de aliaj landoj kaj moderna muziko. Li satas legi librojn kaj rigardi interesajn filmojn. Li tre satas bestojn. Krom Esperanto li konas ankoraŭ rusan lingvon. Adreso: Roman Gawron, Plac 3. Maja 10/13, 97-500 Radomsko, Pollando.

29-jara flegistino interesiĝas pri turismo, distra muziko kaj kolektas bildkartojn. Adreso: Małgorzata Kęcka, 26-600 Radom, ul. Odlewnicza 2 m.37, Poll.

18-jara lernanto interesiĝas pri Esperanto, sako, filatelo, elektroniko kaj muziko, kolektas poŝtmarkojn. Adreso: Jaroslav Szejner, Podzamcze 17, 87-721 Raciążek, woj. Włocławskie, Poll.

26-jara litova esperantistino deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri montara turismo, etnografio, vojaĝoj. Adreso: Daiva Samulėnaitė, SU-232040 Vilnius-40 P.O. Box 1467, Litovio, SU.

27-jara litova e-istino deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri literaturo, muziko, vojaĝoj, Esperanto-instruado. Adreso: Dalia Bičiūnaitė, SU-232040 Vilnius-40 P.O.Box 1497, Litovio, SU.

# ZE SEKRETARIÁTU

## Záměry na kongresy v roce 1989:

V r. 1989 plánuje ČES uspořádat prostřednictvím CK Čedok zájezdy:

- 1) Na 74. UK do Brightonu, Velká Británie, cca 10 dnů autobusem, konec července, začátek srpna
- 2) Na 31. kongres IFEF do Barcelony, spojený s okružní jízdou MSR, Francie, Španělsko, Itálie, Rakousko, cca 14 dnů vlakem. Členové sekce Železničářů mají přednost.

Předběžné přihlášky na oba zájezdy zasílejte na adresu: ČES, turistická komise, Jilská 10, 110 01 Praha 1. -sob-

## De la redakcio...

Pardonpeto pro eraroj.

En la 1-a n-ro en artikolo "De kie venis la supersignitaj literoj?" sur pg. 6-8 estas erare lokitaj referenc-ciferoj: anstataŭ ĉe la komenco de sekvanta alineo ili devis esti ĉe la fino de la antaŭstaranta alineo.

En la 3-a linio de sube sur pg. 8 devus esti ĝuste "akno - okna".

En la 2-a n-ro sur pg. 20, 7-a linio de sube devas esti "somatologio" anstataŭ stomatologio, kio estas la scienco pri la dentoj.

Ni petas pardonon de la aŭtoroj kaj de la legantoj.

Niajn kontribuantojn ni atentigas, ke artikolojn por unuopaj numeroj de Starto estas necese sendi al la redakcio laŭ jenaj datimoj:

por n-ro 3/1989 ĝis la 10-a de februaro 1989,	
4	10-a de aprilo 1989,
5	10-a de junio 1989,
6	10-a de julio 1989,
1/1990	10-a de septembro 1989,
2	10-a de novembro 1989,
3	10-a de januaro 1990.

Organizantojn de Esperanto-arangoj ni atentigas, ke informoj pri la arangoj devas veni al la redakcio minimume 6 monatojn antaŭ la arango. Sciigon pri seminario en junio, kiu venis al la redakcio en majo, ni ne povas aperigi.

INTERNACIA KORESPONDA SERVO helpas al vi trovi korespondant/in/on, amik/in/on aŭ partner/in/on. Por pluraĵ informoj sendu unu internacian respondkuponon al:  
Box 163 Stn. "A" DOWNSVIEW, Ont.

M3M 343 Canada

Klaus-Dieter Scholz, PSF 2078, Erfurt  
DDR - 5060, Germana Demokratia Respubliko  
intersanĝas LP-diskojn, CD-diskojn, postmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika arango), Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas OKP-6 LIBEREC. Transdonita al presejo 1988-08-15. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanousek (grafická úprava), M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 LIBEREC. Předáno do tisku 15. 8. 1988. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povoleno Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.



multe da sukcesoj  
en la nova jaro

deziras al vi

estrano de ĉea  
redakcio de starto

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**

**Snížený poštovní poplatek povolen**

**Ředitelstvím pošt Praha**

**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**